

# Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 5-an de decembro 2022 per Zoom

## Ĉeestis

Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Marianne Lund.

### 1. Aprobo de la tagordo

Ni aprobis la tagordon.

### 2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 3-an de novembro 2022

La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

### 3. Esperantonia

Okazis komuna retkunveno la 21-an de novembro inter la estraro de NEL kaj la Esperanto-klubo de Oslo. Ĉeestis de NEL Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen kaj Claude Rouget kaj de la Oslo-klubo ĉ. kvar membroj. Oni diskutis alternativojn solvojn pri Esperantonia surbaze de la nunaj ekonomiaj informoj. La estraro de NEL opinias, ke ne eblas trovi malpli kostan ejon, funkciantan kaj kiel oficejo, kunvenejo kaj stokejo. Tial ĝi ne proponos al la venonta landa kunveno vendi Esperantonia-n.

### 4. Membroregistro

Marianne sendos la malnovan kalkulpaĝan membroregistron al Claude, kaj ili kune faros aktualan membroregistron kun informoj pri pagintoj.

### 5. Jarraporto 2022

Ni intencas simpligi la jarraporton. Ni dividis la laboron pri la jarraporto jene:

Ekstera informado – Lars

Instruado – Marianne

Kontakto kun kluboj kaj membroj – Jardar

Administrado – Bård

Ekonomio – Claude

### 6. Landa kunveno

La estraranoj sentas ke mankas al ili kapacito aranĝi fizikan kunvenon en Oslo. Ni decidis proponi retan kunvenon dum unu aŭ du vesperoj en junio. Bård kontaktos la klubon de Oslo pri tio.

### 7. Skanado de Norvega Esperantisto

Ni provu organizi skanadon de Norvega Esperantisto per la projekto bitarkivo.org en Hispanio.

### 8. Venontjara kotizo por gejunuloj

Ni decidis frostigi la kotizon ankaŭ por gejunuloj (je 260 kronoj), same kiel por plenkreskuloj.

### 9. La heredaĵo de Ester Olsen

Hilde Dalberg prenis E-aĵojn de la hejmo de E. O. La makleristo malplikostigis sian vendoferton.

### 10. Vortaro – prokrastita

### 11. Eventualaĵoj – neniu

### 12. Venonta estrara interkonsiliĝo

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 5-an de januaro je la 20-a horo.

Protokolis Marianne Lund